ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 1

Januaro 2016 Kol.369/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Novjara parolo, Pri UK Nitra, UEA serĉas volontulojn, Srilanko, La kvina ŝaktrajno, Du vagonkombinaĵoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Estimataj kaj karaj geamikoj,

P.F. 2016

forkuris plua jaro, en kiu ni komune travivis multon da belaj momentoj en E-eventoj. Kelkaj partoprenis la buskaravanon, kiun ni organizis al la jubilea centa UEA-kongreso en la franca urbo Lillo, iuj tien vojaĝis memstare. Pri la belaj renkontiĝoj kun preskaŭ tri miloj da esperantistoj el 82 landoj de la tuta mondo ni rememoros tre longe.

Sed ne estis nur la granda kaj pompa UK, sed ankaŭ ekzemple la sukcesa lernejo en Bartošovice, lingvaj seminarioj en Skokovy, Jevany, BIERo (Brila Internacia E-Renkontiĝo) kaj aliaj eventoj de E-Mental, konferencoj de ĈEA, E-muzeaj kaj pluaj renkontoj organizitaj de ceteraj E-kluboj, ili ĉiuj estis eminentaj renkontoj kun egalcelantaj homoj, kiuj ĉefe interesiĝas pri paco kaj amikeco inter la nacioj. Ni memoros ankaŭ pri tio, ke ni ne travivu nian vivon en enuo, malintereso kaj soleco.

Tial ni preparas por vi jam ankaŭ la 19-an ESPERANTO-TAGON, nun en la kastela kafejo en Pardubice kaj la 4-an de junio 2016 ni ĝojatendas vian multnombran partoprenon.

Krome ni povos renkonti vin ĉe la 101-a UK, kiu okazos en la slovaka urbo Nitra. Ĉar la kongreso estos en la najbara lando, ĉiu tien povos vojaĝi trajne, buse aŭ aŭtomobile. Laŭdire tie estas multaj studentaj tranoktejoj, do ankaŭ ricevi tranoktadon ne estos problemo.

Do, ek al la nova jaro 2016, kiu denove estos plena de E-kulturaj aŭ turismaj aranĝoj, ekskursoj, renkontoj, ekkonadoj kaj ridetoj.

Mi deziras al vi multe da sano, feliĉo, pozitivaj pensoj, multe da emo en la vivo ne nur Esperanta kaj ankaŭ sufiĉe da mono, ke vi povu partoprenadi tiujn aranĝojn, ĉar bedaŭrinde eĉ la vojo al renkontiĝoj ne estas senpaga. Kaj mi esperas, ke vi ĉiuj restos plu niaj membroj, favorantoj kaj kontribuantoj, ĉar sen viaj interesaj raportaĵoj ne estus, per kio plenigi nian gazeton Informilo ankaŭ por la legantoj, kiuj jam ne povas partoprenadi niajn aranĝojn. Samtempe mi volus sincere danki al ĉiuj, kiuj iamaniere helpis al ni realigi niajn aranĝojn.
Je plua kunlaboro antaŭĝojas via AEH-prezidantino Lenka Angelová

Pri la venonta kongreso en Nitra

El parto de gazeta komunikilo de UEA:
Petro Baláž skribas, ke la loĝado dum la 101-a UK estos tre malmultekosta. "Ekzistos tranoktebloj en studentaj hejmoj kun prezoj de 7 ĝis 12 eur por nokto. La plej malaltpreza tutsemajna restado en studenta hejmo kostos nur 49 eur en dulita kaj 81 euroj en unulita ĉambro. Do, la kongreso estos eltenebla finance – kaj certe partopreninda enhave", promesas la prezidanto de LKK.

Por ebligi la partoprenon al kiel eble plej multaj esperantistoj, precipe el orient-eŭropaj landoj, por kiuj alie tio estus finance apenaŭ ebla, UEA alvokas por solidaraj mondonacoj. Oni povas sendi ilin pere de kiu ajn el la pagmanieroj ĉe http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj (bv. klare indiki la celon, ekz. "helpo Nitro").
Reta aliĝilo de la 101-a UK: http://www.uea.org/kongresoj/aliĝilo
Membro-aliĝilo de UEA: http://www.uea.org/aliĝoj/aliĝilo

Osmo Buller, UEA

UEA serĉas volontulojn

Iĝu plentempa volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la Esperanto-movado, sed estas samtempe persona pliriĉiĝo. La volontuloj laboras en la koro de la Esperanto-movado – la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO, povas kunlabori pri

tre interesaj projektoj, partoprenadi aranĝojn kaj kunlabori en la tutmonda medio. La maksimuma daŭro de la volontulado dependas plej forte de la vizaj kondiĉoj, kiel minimumo estas preferinde, ke la volontuloj restu almenaŭ 2 monatojn. Kiel volontulo vi certe lernos memstare labori kaj povos profundigi viajn spertojn, interalie en la sube menciitaj taskoj.

La laboro povos konsisti ekzemple el:
• reprezentado kaj informado dum kongresoj, kunvenoj kaj seminarioj
• subteno de la organizado de kongresoj, kunvenoj kaj seminarioj
• ĵurnalistaj aktivaĵoj: uzo de sociaj retoj kaj aliaj iloj por plibonigi la informfluon
• prizorgi kontaktojn kun membroj, partneroj kaj la ĝenerala publiko
• asisto en projektmastrumado
• prizorgo de la arkivoj kaj biblioteko
• kunlaboro kun la estraranoj kaj aliaj aktivuloj de UEA
• individuaj projektoj komencitaj de la volontulo
• tenado de kontakto kun la loka komunumo
• kreado, prizorgado de retejoj
• partopreno en la preparado de diversaj gazetaraj materialoj

La ideala kandidato:
• havu bonan (almenaŭ C1-nivelan) scipovon de Esperanto (legan, skriban kaj parolan); scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata
• estu sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, interreto, tekstprilaborado ktp.)
• estu preta aktive kunlabori kun aliaj aktivuloj.
La volontuloj eklaboros plej frue en majo 2016 por prefere unu jaro, tamen eblas interkonsenti pli malfruan komencon (ĝis septembro), kaj ankaŭ pli mallongan volontuladon. Ili ricevos poŝmonon kaj manĝmonon.

Se vi volas kandidatiĝi, sendu retpoŝte al volontuloj@co.uea.org la jenajn dokumentojn (en Esperanto):
• vivresumon (priskribantan viajn studojn, kursojn, spertojn movadajn kaj ekstermovadajn ktp.)
• motiviĝan leteron (priskribantan, kial vi volas volontuli, kiaj taskoj estas plej proksimaj al vi kaj plej entuziasmigas vin, kaj kiam vi povos komenci la volontuladon)

• informon pri la viza situacio de la kandidato por volontuli en Nederlando
• laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj
• laŭeble rekomendletero(j)n, ekz. de landa Esperanto-organizaĵo

La limdato por sendi kandidatiĝon estas la 10-a de januaro 2016, ĝis la 23:59 laŭ la horzono de la Centra Oficejo. Do, ne maltrafu la ŝancon!

Se vi havas aldonajn demandojn pri la programo, ne hezitu skribi al volontuloj@co.uea.org. el UEA

La 3-a Sud-Azia Seminario en Katunayake Srilanko 31.10. — 4.11. 2015

Srilanko — verda insulo banata de la Hinda oceano troviĝas proksime al la suda parto de Barato. Subtropika vetero favoras kreskadon de vegetaĵaroj kaj diversspecaj palmoj. Ĉarmas belaj plaĝoj kaj fortaj ondoj, kiujn ĝissate ĝuis nepalanoj.

Nepalaj esperantistoj de NEspA sub la gvido de Bharat Gimire, la ĉeforganizanto, en kunlaboro kun la unusola esperantisto en Srilanko s-ro Zeiter Perera kaj kun helpo de Pradip Gimire kaj Hori Jasuo sukcese aranĝis la 3-an SAS en proksimo de la urbo Kolombo. KAEM subtenis la aranĝon finance. La seminaria temo estis: “Interkultura kompreniĝo”.

Komencaj necertecoj pri la sukceso estis rapide anstataŭataj de entuziasmo kaj ĝojo ĉe la alveno al Srilanko. La eventon partoprenis dudek unu esperantistoj el Nepalo, kvin el Barato, unu el Pakistano, unu el Japanio, unu el Srilanko kaj du el Francio, kiuj estis la solaj esperantistoj el Eŭropo.
La programo komenciĝis sabate posttagmeze la 31-an de oktobro 2015 per la registrado de la partoprenantoj. Ekfunciis ankaŭ malgranda libroservo. Poste okazis la unua komitata kunsido kaj samtempe Hori Jasuo instruis la E-himnon, montris kaj sonigis diversajn muzikilojn. Dum la interkona vespero prezentiĝis ĉiuj partoprenantoj kaj vigle interbabilis pri diversaj temoj kaj pri siaj ŝatataj hobioj.
Dimanĉe okazis la malfermo de la seminario. Bonvenigis nin s-roj Bharat Gimire kaj Zeiter Perera. Hori Jasuo, kiel honora gasto en la ĉeesto de la aliaj komitatanoj lumigis tri kandelojn simbole al la 3-a SAS. Poste estis legataj salutmesaĝoj de UEA, KAEM, ILEI. Sekvis salutoj de reprezen-

tantoj el diversaj landoj. Liba salutis nome de ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj kaj Floreal nome de la francaj. Okazis E-kurso por komencantoj kaj por progresintoj. Hori Jasuo parolis pri Esperanto-Sumoo. Post la tagmanĝo, en la prelego de Cholnath Pokhrel, ni ekkonis la nepalan kulturon.
Diversregionaj popoldancoj estis montritaj sur televid-ekrano. Pri la Esperanto-movado en Barato raportis sinjoroj Reddy, Siva kaj Giri.

Vespere ni spektis buntan dancprogramon de nepalaj samideanoj. Belege vestitaj virinoj en naciaj kostumoj prezentis serion da dancoj kaj kantis nepale. Ili informis pri baldaŭa festo de la Lumo – *Divali*, kaj estis lumigitaj pluraj kandeloj. Tre bela kaj gaja etoso daŭris ĝis la noktomezo.

La belecon de la verda insulo ni admiris sekvan tagon dum la tuttaga ekskurso. Survoje al la urbo *Kandy*, kiu troviĝas 116 km for de Kolombo ni unue haltis en herboĝardeno, kie oni klarigis al ni la utilecon de diversaj unuopaj herboplantoj. Eblis aĉeti produktojn kontraŭ diversaj doloroj kaj malsanoj.

En la urbo Kandy ni vizitis la templon *Dala da Malgawa*, (Templo de la Dento). Pro la malboniĝinta pluvega vetero ni ne povis viziti la faman botanikan ĝardenon *Peradeniya*. Survoje al la urbo *Nuwara* en alto de 1900 metroj meze de teoplantejoj. En *Ramboda* ni haltis kaj vizitis la teofabrikon *Blue Field* kun klarigoj pri diversaj teoj (nigra, verda, blanka) kaj vidis la procedon de iliaj fabrikadoj.
En Srilanko oni ĝis nun rikoltas la teofoliojn permane. Laŭdire srilankaj teoj estas la plej bonaj en la mondo. Marde okazis denove Esperanto-kursoj kaj la dua komitata kunsido, en kiu oni decidis starigi fonduson por Sud-Azio. S-ro Saeed el Pakistano prelegis pri islamismo kaj sufiismo. Diskuton pri la seminario gvidis s-ro Giri el Barato. Ni ankaŭ eksciis pri srilanka kaj nepala movadoj kaj ricevis informojn rilate al Esperanto pri aliaj sudaziaj landoj. Kun Bharat la partoprenantoj lernis kelkajn E-kantojn.

Posttagmeze Hori Jasuo prezentis kaligrafion kaj ni skribis la vorton amikeco en diversaj lingvoj. La geedzoj Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmon pri la lastjara Unua Speciala Renkontiĝo en Nepalo. Vespere ni okazigis bankedon kaj bingo-ludon lerte prezentatan de nia japana samideano Hori Jasuo. Li ankaŭ provizis valorajn premiojn por ĉiuj. Je la fino ni aŭskultis kelkajn kantojn kaj dancis en akompano de tamburo ludata de Bharat ĝis malfruaj horoj.

Liba Gabalda

El fervoja mondo - Ĉeĥio:

Kvina ŝaktrajno allogis rekordan nombron da ŝakludantoj

Vendrede la 5-an de oktobro 2015, antaŭ naŭa horo matene aspektis pasaĝerkajo nro.1 en la Prago-ĉefstacio kiel tuŝapude antaŭ forveturo de transoceana ŝipo. Proksime de la Registara saloneto amasiĝis valizoj kaj pasaĝeroj de multaj kulturoj kaj lingvoj, kaj regis tipe maskerad-etoso antaŭ longa vojaĝo. La kialo estis la netradicia projekto, neniel simila estas en la mondo.

Temis pri ŝaka trajno, kiu ĉijare ekveturis al sia kvintaga pilgrimado jam kvinan fojon, kaj ĝiaj 120 pasaĝeroj estis ŝatantoj de ŝakludo, profesiaj kaj amatoraj. Trajnkurso iris el Prago tra Dresdeno, Vroclavo, Bratislavo kaj Vieno reen al Prago.

Dum salutparoloj antaŭ ekveturo partoprenantojn salutis kaj agrablan vojaĝon deziris al ili *Pavel Krtek*, la estrarana prezidanto de Ĉeĥaj Fervojoj, kiu estas tradicia ĝenerala partnero de la projekto. Ili aŭdis ankaŭ interesan informon de *Pavel Matocha*, la prezidanto de organizanta Prago-ŝaka kompanio. Tiu ĉi informis, ke ĉijare la organizantoj la unuan fojon ne povis plenumi dezirojn de ĉiuj interesatoj pri tiu ĉi neordinara ŝaka travivaĵo. “Kvankam ni danke al favoro de Ĉeĥaj Fervojoj povis aldoni al la trajno plian vagonon, ni tamen devis la lastajn dek kvin ŝakistojn seniluziigi”, li priskribis la enorman intereson pri ŝakturniro en trajno.

En la dekunuvagona trajno mezuris siajn kapablojn dum dek unu rondoj en rapida ŝako rekordaj 120 ŝakistoj el 19 landoj de la mondo, la plej juna estis dekjara. Al la favoratoj por la fina venko en la turniro apartenis ekde la komenco kvar grandmajstroj – *Julio Sadorra* el Filipinoj, *Lars Karlsson* el Svedio, *Raj Tischbierek* el Germanio kaj *Ján Plachetka* el Slovakio. La ŝakbatalojn partoprenis ankaŭ ses ŝakistoj reprezentantaj Ĉeĥajn Fervojojn *Jaroslav Satranský, Ladislav Winkelhöfer, Pavel Popelka, Pavel* kaj *Vojtěch Straka* kaj *Taťána Šeráková*.

Ĉar la veturtempo por plenumi unuan ŝakrondon ne estis sufiĉa, la organizantoj serĉis eblojn, kiel plilongigi la "veturtempon". Oni do trovis solvon per trafiko de trajno gvidata de la "ŝaka" lokomotivo 362.030 sur ĉirkaŭvojo tra la praga fervojnodo, tra *Vršovice, Malešice, Libeň* kaj *Holešovice*, kaj tiamaniere plilongigis la vojaĝtempon per pli ol 20 minutoj. Sed jam en *Ústí nad Labem* la trajno venis pli frue kaj atendis ĉirkaŭ kvin minutojn por pluveturi „laŭ la horaro". Ĉion oni tamen plenumis laŭ la plano kaj en la momento, kiam en la lokomotivŝanĝa stacio *Děčín* transprenis la trajnon la lokomotivo 372.010 de la entrepreno *ČD Cargo*, plimulto da ŝakludoj de la unua rondo estis jam finluditaj.

La veturon al la celo de la unua tago la ŝakludantoj kaj iliaj akompanantoj (en la trajno komune vojaĝis ĉirkaŭ 200 homoj) ĝuadis en agrabla spaco de du bufedaj vagonoj, envicigitaj en la trajno. Pri gastronomiaj priservoj zorgis kiel en la antaŭaj jaroj kompanio *JLV* (restoraci - kaj litvagonoj). Kaj kiam novaj partoprenantoj estis iomete lacaj, ili povis post la finludo refreŝiĝi per spekto de la bela ĉirkaŭa pejzaĝo en la rivervalo de Elbo, la pli spertaj matadoroj preferis babiladon ĉe bufedtabloj kaj gustumadon de trinkaĵoj, el kiuj plej preferata estis la konata likvoro *Becherovka*.

Kaj kiel la ŝaka pilgrimado finiĝis? La supozoj plenumiĝis, sur la ŝtupoj por venkintoj triumfe staris post kvintaga turniro en rapida ŝako kun akiritaj dek poentoj la sveda grandmajstro *Lars Karlsson*, arĝenton prenis la filipina grandmajstro *Julio Sadorra*. La venkan grandmajstran triopon kompletigis la germano *Raj Tischbierek*. La plej bona reprezentanto de Ĉeĥaj Fervojoj okupis la tre bonan dekduan lokon.

Kompilis Jindřich Tomíšek

Italio: **Du energiaj vagonkombinaĵoj *Flirt* estos direktataj al Italio**

La kompanio Stadler ricevis mendon por produkti la unuajn kvin du energiajn trivagonajn kombinaĵojn Flirt 3 kontraŭ 43 milionoj da eŭroj, por la itala fervojlinio Aosta – Turino. La kontrakto enhavas ankaŭ opcion por pliaj 5 veturilkombinaĵoj. Tiuj ĉi ofertas po 178 sidlokojn. En elektra trakcio laŭ la sistemo 3 kV kontinu-kurento ili atingos povumon de 2 600 kW kaj rapidon de 160 km/h. En dizeltrakcio ili havos povumon de 700 kW kaj rapidon de 140 km/h. Du energiaj veturiloj ebligas trafikon sur neelektrizitaj kaj ankaŭ elektrizitaj fervojlinioj. Ili estas disvastigitaj precipe en Francio, kie estas ekspluatataj pli ol 400 el la kompanioj Bombardier kaj Alstom.

Por dokumenti, ke la katolika Papo Francisko estas favoranto ankaŭ de fervojistoj, mi aldone sendas dokumentan foton, sur kiu la Papo dum renkontiĝo kun italaj fervojistoj spontane surmetis fervojistan ĉapon.

Jindřich Tomíšek

NE FORGESU REABONI INFORMILON !

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.